

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

novembro / decembro 1991



**Komuna kongreso de GEFA kaj Bavelo en
Friedrichshafen 11a ĝis la 13a de oktobro 1991**



Luftbild Friedrichshafen mit Blick auf Altstadt, Yachthafen und Schloßkirche
Foto: Albrecht Brugger, Stuttgart-Flughafen

Komuna kongreso de GEFA kaj BAVELO en Friedrichshafen

Kiam la aŭtuno demonstras sian koloran belecon, altiras la esperantistajn fervojistojn aparta evento: la ĉiujara kunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Tiu ĉi, intertempe jam la 35a, okazis de la 11a ĝis la 13 de oktobro 1991. Gastiganta loko estis la havenurbo Friedrichshafen idilie situanta ĉe la Konstanca Lago. Dum la vojaĝo tien, sur la kurboriĉa fervojlinio tra la Nigra Arbaro, ofertis sin mirinda pejzaĝo. Kamparaj domoj kun tipa groptegmento, apude gregoj de bovinoj, enmeze de montaro kaj arbaro, demonstris la belecon de tiu regiono. La suno brilis sur la surfaco de la Konstanca Lago, kiam la trajno atingis la kongresurbon.

La kongreso estis komuna aranĝo de GEFA kaj BAVELO (Baden-Virtenberga Esperanto-Ligo). Tio montriĝis favora por ĉiuj. Sabaton vespere oni konatiĝis en la stacidoma restoracio kaj spektis varbfilmon de DB, en kiu la romanfiguro La kara Aŭgustin ludas centran rolon. Videblaj estis mirindaj lokoj ĉirkaŭ la Konstanca Lago facile atingeblaj per DB-ŝipoj. Dum du laborkunsidoj la delegitoj okupiĝis pri multaj temoj, ĉu pri la venonta 44a IFEF-kongreso, ĉu pri varbado, telekurso, nacia vortaro. La kunsidojn gvidis lerte GEFA-prezidanto Joachim Giessner. Lia jarraporto troviĝas sur alia paĝo de tiu BULTENO. Ĝojige estis, ke kelkaj kolegoj el la novaj federaciaj landoj partoprenis la kunvenon kaj povis doni informojn pri la postkongreso (23.05. - 28.05.1992). Vidu la informojn en Internacia Fervojisto.

En la festvespero LKK-estro Siegfried Krüger kaj GEFA-prezidanto Giessner bonvenigis la ĉeestantojn, inter ili la staciestro, reprezentanto de la urbo, komisiito de la fervoja direkcio Stuttgart por socialaj aferoj, la honoraj membroj de IFEF Kruse kaj van Leeuwen,

BAVELO-prezidantino Niesert kaj GEA-sekretario Hirsch. Nome de la landaj sekcioj de IFEF transdonis salutojn la gesinjoroj: Pattek (Aŭstrio), De Sutter (Belgio), Feifiĉová (Ĉeĥoslovakio), Vonay (Francio), van Leeuwen (Nederlando), Eggenberger (Svislando). Aŭdiĝis konataj arioj el operoj kaj belsonaj muzikaĵoj de blokvarteto. Por la dancemuloj eksonis ĝis meznokto plaĉaj melodioj. Estis harmonia vespero.

Escepte de delegitoj, kiuj diskutis en laborkunsidoj, la kongresanoj povis viziti la vidindaĵojn de Friedrichshafen, precipe la barokan kastelan preĝejon, la Zeppelin-muzeon kaj la DB-ŝipfarejon. La ekskurso per speciala DB-ŝipo suferis bedaŭrinde pro la preskaŭ konstanta pluvo. Tamen, akompanite de gentilaj gvidantinoj, oni vizitis la romantikan, historian de la insula urbo Lindaŭ. La dimanĉo komenciĝis per deca ekumena diservo, dum kiu la blokvarteto akompanis la komunajn kantojn. Kulmino de la matineo estis sendube prezentado de unuopaj scenoj el modernaj teatraĵoj de konataj aŭtoroj. Tiu juna teatra teamo de internaciaj amatoj „Kia Koincido” meritis plene la aplaŭdon de la spektantoj.

Ankoraŭ oni tagmanĝis kiel dum la antaŭaj tagoj. Kontentaj mienoj, dankemaj frazoj, promesoj revidi sin eble plej baldaŭ. Kelkui libro el la riĉe ekipita librostando estas aĉetita. Ke tiu 35a jarkunveno de GEFA bonege kaj harmonie okazis estas precipe la merito de s-ro Siegfried Krüger, komisiito por Esperanto en la fervoja direkcio Stuttgart. Sed ankaŭ BAVELO multe kontribuis al la sukcesplena kongreso. Al ĉiuj kore dankas la partoprenintoj. Verŝajne ne okazos jarkunveno venontan jaron pro la antaŭa IFEF-kongreso en Münster.

W. B.

Harmonisches Herbsttreffen in Friedrichshafen

Zum 35. Mal lud die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW (GEFA) zu ihrer traditionellen Jahresversammlung ein. Die Anhänger der internationalen Sprache folgten gerne der Einladung nach der reizvollen Hafenstadt am Bodensee. An der Tagung nahmen auch Kollegen aus den neuen Bundesländern sowie Gäste aus dem

Ausland teil. Positiv erwies sich, daß der Esperanto-Verband Baden-Württemberg (BAVELO) dort gleichzeitig seine Tagung abhielt. Hierdurch wurden die organisatorischen Vorbereitungen erleichtert und das Veranstaltungsprogramm belebt.

In seiner Begrüßungsansprache am Festa-

bend wies der GEFA-Vorsitzende, Herr Joachim Gießner, auf das ermutigende Schreiben des Ministerpräsidenten Teufel (Baden-Württemberg) hin.

Für den BSW-Bezirk Stuttgart überbrachte den 146 Teilnehmern Herr Siegfried Rüffer wohlgemeinte Grüße und Wünsche. Er erläuterte die vielseitige Freizeitbetätigung auf kulturellem Gebiet, wobei die Eisenbahner-Esperantisten eine besondere Rolle spielen. Sie überwinden die Verständigungsschwierigkeiten durch die gemeinsame Sprache Esperanto. Herr Dr. Lösch begrüßte herzlich die Anwesenden namens der Stadtverwaltung. Auch die Vertreter der ausländischen Landesverbände (Belgien, Frankreich, Niederlande, Schweiz, Österreich und Slowakei) wünschten der Tagung vollen Erfolg. Ihnen folgten Vertreter des Deutschen Esperanto-Bundes und BAVELO. Die Feier wurde umrahmt von Arien, die der bekannte Bariton Walter Lange vortrug, am Klavier einfühlsam von Frau Irmtraut Müller begleitet. Die wohlklingenden Musikstücke des Bläserquartetts unter Leitung von Herrn Siegfried Stauber fügten sich harmonisch in das Abendprogramm ein.

In zwei Arbeitssitzungen behandelten die Delegierten zahlreiche Themen, z. künftige Veranstaltungen auf Landes- und internationaler Ebene. Beraten wurde ferner über Werbemaßnahmen, Esperanto-Fernkursus für Anfänger und Fortgeschrittene, Herausgabe des nationalen Eisenbahnerfachwörterbuchs und Zusammenschluß der Eisenbahner-Esperantisten aus West- und Ostdeutschland. Frau Jana Bruder unterzog sich erfolgreich der Esperanto-Sprachprüfung. Beim Kulturmatinee am Sonntag, dem ein

eindrucksvoller ökumenischer Gottesdienst vorausging, erstattete der GEFA-Vorsitzende Gießner den Jahresbericht. Er erinnerte dabei auch an die verstorbenen Mitglieder der Vereinigung. Die rührige, jugendliche Gruppe "Kia Koincido" zeigte ihr beachtliches Können anhand ausgewählter Szenen aus Theaterstücken moderner Autoren. Der Beifall der Zuschauer war wohlverdient.

Die nicht an Arbeitssitzungen gebundenen Teilnehmer konnten bei der Stadtführung auch das Zeppelin-Museum sowie die Bundesbahnwerft besichtigen. Leider litt die Fahrt mit einem DB-Sonderschiff unter ungünstiger Witterung. Mit einem Schirm bewaffnet besuchten die tapferen Ausflügler die romantische Altstadt von Lindau. Eine sonnige Bodenseelandschaft vermittelte dagegen am Abend zuvor der lustige DB-Film "Auf den Spuren des lieben Augustin".

Das Herbsttreffen in Friedrichshafen (11. - 13. Oktober 1991) verlief erfolgreich und harmonisch. Die Gesprächsbereitschaft war groß, besonders wenn man sich mit ausländischen Gästen unterhielt. Vorbereitung und Durchführung der Veranstaltung lagen vorwiegend in den Händen des bewährten Beauftragten für Esperanto im DB-Bezirk Stuttgart, Herrn Siegfried Krüger. Der Esperanto-Verband Baden-Württemberg unter der Leitung von Frau Dr. Ursula Niesert leistete gute, organisatorische Hilfe. Für den reichhaltigen Bücherstand war Herr Johann Pachter verantwortlich. Ihnen allen ist für die vorbildliche Zusammenarbeit ganz herzlich zu danken. Im Herbst 1992 wird die Jahresversammlung wegen des vorangegangenen IFEF-Kongresses voraussichtlich entfallen.

W. B.



Nochmals: IFEF-Kongreß 1992

Beachten Sie bitte, daß alle offiziellen Informationen für den 44. Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes (IFEF) in dessen Organ Internacia Fervojisto veröffentlicht werden. Sie werden im BULLENO nicht wiederholt. Der ermäßigte Kongreßbeitrag kann nur noch bis zum 31. Januar 1992 überwiesen werden. Ab 1. Februar gelten erhöhte Beiträge. Senden Sie daher baldmöglichst Ihre Anmeldung an ""44a IFEF-Kongreso, Postfach 10 04 30, D-W-6360 Friedberg (Hessen).

Im Preis von 65,- DM für den ganztägigen Busausflug ist ein Mittagessen eingeschlossen. Aus technischen Gründen ist die Teilnehmerzahl für die Besichtigung der Transrapid-Versuchsstrecke begrenzt. Melden Sie sich

daher jetzt verbindlich an. Der Preis von 35,- DM für den Halbtagsausflug zu den Wasserschlössern enthält auch ein Kaffeegedeck.

Die Kollegen der Deutschen Reichsbahn bieten als Nachkongreß einen Aufenthalt mit Vollpension in einem Hotel in Friedrichsbrunn (Ostharz) an. Mit Bus und Bahn werden Ausflüge auf den Brocken, dem höchsten Berg im Harz, nach Quedlinburg, Goslar und zu anderen Zielen unternommen. Der Pauschalpreis für den Zeitraum vom 23. bis 28. Mai 1992 beträgt 459,- DM je Person im Zweibettzimmer (DU/WC). Weitere Einzelheiten siehe im Verbandsorgan Internacia Fervojisto. Wir empfehlen die Teilnahme.

LKK

Achtung! NACHKONGRESS

Auf den Anmeldevordrucken für den Nachkongreß im Mai 1992 fehlt z. Teil der Vermerk, wohin sie zu senden sind. Bitte senden an Achim Meinel, Leninpl. 31, O-1017 Berlin.

Fervojaj novaĵoj

Berlin

Estas projektite konstrui apud la ekzistanta fervojlinio inter Hannover kaj Berlin dua linion, kiu ebligos grandrapidan trafikon (250 km/h) ek de 1997.

Bern

Pro tro granda nombro de kaminoj (700 000 jare) transveturantaj Svislandon la svisa registaro esploras la konstruon de du longaj fervojtuneloj (49,2 kaj 28,4 km) sub la Alpoj.

Bonn

S-ro Heinz Dürr, ĉefestrarano de la Germana Federacia Fervojo (DB), ricevis de trafikministro Kraüse la oficon prezidi ankaŭ la Germanan Regnan Fervojon (DR).

Frankfurt

Kelkaj statistikaj indikoj pri DB kaj DR en 1990:

		DB	DR
Fervojistoj		232 394	229 841
Fervojreto	normalŝpura	26 943	13 767
(en km)	etŝpura	6	273
Pasaĝertraĵoj	potage	21 827	9 254
Elektraj lokomotivoj		2 534	1 317
Vaporlokomotivoj		0	283

Lohr

Inter Lohr kaj Gemünden estas konstruata nova fervojlinio, kiu interligos la linion Frankfurt (M) - Würzburg kun la rapidtrafiklinio Fulda - Würzburg. Pro starigo de 700 m longa ponto super la rivero Main la ekekspluatado de la nova linio komenciĝos nur en 1995.

Madrid

Ĝustatempe antaŭ la mondekspozicio Expo '92 estos finkonstruata la nova stacidomo Santa Justa en Sevilla. La stacio disponas pri 15 reloĵoj. La planita rapidtrafiko sur normalŝpura fervojlinio inter Madrid kaj Sevilla prokrastiĝas.

München

En Germanio 37 milionoj da pasaĝeraŭtoj bezonas 2 000 kvadratkilometrojn kiel parkareojn. Meznombro tiuj aŭtoj estas eluzataj dum 40 minutoj potage. Nur ĉiu 50a aŭtovetruro trapasas distancon de pli ol 50 km.

London

La laboroj por la submara tunelo inter Francio kaj Britio prokrastiĝas pro financaj problemoj. Ek de septembro 1993 veturo tra du tuneloj kvar diversaj specoj de trajnoj: naveltrajnoj por pasaĝeraŭtoj kaj similaj por kamionoj, trajnoj por konteneroj kaj rapidaj pasaĝertrajnoj.

Paris

Francaj inĝenireoj esploras la konstruon de grandrapidaj vartrajnoj surbaze de la duetaĝa TGV-versio. Temas pri 20 m longaj boĝiaj veturiloj kun 3 m larĝaj pordoj kaj maksimume 17 t radaksa ŝarĝo.

Tokio

La japana trafikministerio vendis kvar fervojretojn por la grandrapida trajno Shinkanese al tri privataj societoj. Kaŭzo: tro grandaj ŝuldoj.

Komp. el "Blickpunkt Bahn" k.a. de W.B.

Jarraporto

pri la periodo de la 34a ĝis la 35a jarkunveno (1990/1991)

Enkonduko

Laŭ diversaj kriterioj la pasinta raporto-periodo estis nenormala, ĉar daŭris kaj plifortiĝis la vico de revolucioj en Eŭropo. Ŝokis la mondon la terura milito ĉe l'Golfo, kiun neniel sekvis sopirita vera paco. Eĉ pli profunde skuis la evoluon en Sovetunio, la tiea tritaga puĉo kaj fine ankaŭ la batalado en Jugoslavio. Ankoraŭ ĉio fluas, kaj ne jam klara estas la influo de ĉiuj tiuj eventoj al politiko, ekonomio kaj ekologio. Klare estas nur, ke la novkonstruado de la mondo kostos neimageble multe da mono kaj homa streĉado, kio tutcerte ankaŭ tuŝos la Esperanto-movadon, ne laste la fervojistan en Germanio. Ĉe la ankoraŭ dise funkciantaj du germanaj fervojoj DB kaj DR amasiĝas la problemoj. Precipe ĉe la kolegoj de DR ne prederevideblas la ekonomiaj zorgoj kaj timo pri laborlokoj. Kvankam la sociala organizo BSW ĝenerale jam agas en ambaŭ teritorioj, kaj kvankam Germana Esperanto-Asocio unuiĝis kun la respektiva asocio de iama GDR, niaj kolegoj en la orientaj fervojaj direkcioj ankoraŭ ne trovis vojon al komuneco kun GEFA. Tio ankaŭ kaŭzas, ke en IFEF ankoraŭ ekzistas du germanaj landaj asocioj.

Certe jam per la bela ekstera aspekto oni rimarkas, ke ekde numero 1/91 nia Bulteno estas presata en alia presejo, nun en Bremen. Kaj ni esperas, ke por longa tempo la akurata apero de Bulteno estos certigata.

Niaj ĉi-jaraj mortintoj, pri kiuj ni eksciis, estis

Anlauf Richard	21.11.89
Hiebel Helena (86)	07.09.90
Schmid Willi (85)	Dez. 90
Neumann Emil	29.12.90
Vorhemus Franz (59)	08.04.91
Pscheidt Karl (76)	09.05.91

Ili havu eternan pacon.

Ni gratulis oficiale pro **naskiĝtagoj** al jenaj kunlaborantoj: Werner Heimlich sen. (65), Willi Barnickel (70).

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostatato

Denove ni devis konstati regreson de la membronombro. La kelkiuj novaliĝoj ne povis egaligi la perdojn. Al BSW ni anoncis 386 membrojn (last jare 402). Al IFEF ni pagis en 1991 por 546 personoj inkl. korporativajn membrojn. Tio influas la nombron de niaj IFEF-komitatoj (ekde 1992 nur ankoraŭ tri). La nombro de DB-fervojistoj pluŝrumpis, kvankam ankaŭ ĉi-jare en kelkaj branĉoj DB dungis novajn kunlaborantojn. Tamen la ĝenerala streĉado (dekmiloj da kromhoroj, necertece de laborlokoj) ne favorigas la intereson por lerni fremdan lingvon. Precipe junuloj preferas diskotekojn kaj aliajn ofertojn por plenigi liberan tempon, sed ne spirite postulan agadon.

1.2 Kursoj

Ne okazis memstaraj kursoj por fervojistoj. Nur en du distriktoj ni partoprenis en 3 aliaj kursoj. De la telekurso n-ro 1 estas venditaj ĝis nun 286 ekzempleroj, de kurso 2-36. Bedaŭrinde la plej multaj kursanoj estas ne-fervojistoj. De jaroj plej akurate gvidas tiun kurson F. Lautenbach, dum la administradon prizorgis J. Schrapp, kiu pro sia sanstato ne plu kapablos fari tiun laboron.

1.3 Funkciuloj

La laborkonsilantaro ampleksas 4 personojn (Gießner, Krüger, Graß, Riehn) sen ŝanĝoj. Kunvenoj okazis en Aachen (okt. 90) kaj Fulda (marto 91), tie kun A. Meinel (Berlin) kiel gaston. Kun efiko de 1.1.91 Vitus Röder transdonis la oficon de distriktkomisiito al kol. Reinhard Stoll, Nürnberg (vidu Bult. 2).

La ĉefestraro de BSW kreis novan funkcion por la kulturaj grupoj en formo de "gazetara informanto" (Pressesprecher). Por Esperanto transprenis tiun taskon W. Barnickel. BSW intencas, ekde 1992 aperigi "BSW-Zeitung" en nova formo. Ni esperu, ke tiamaniere ankaŭ la kunlaboro kun "Wir" fariĝos pli fekunda.

1.4 Literaturo, muziko

Ankoraŭfoje ni jen menciu, ke aperis la internacia reglamento "Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de varoj" (CIM). Tradukis ĝin W. Barnickel (Bult. 3/91). Aperis la konata novelo de Rudolf Binding "Moselfahrt aus Liebeskummer" en traduko de E. Kruse sub titolo "Mozela vojaĝo pro amoaflikto" (Bult. 3/91).

Ankoraŭ haveblas kelkaj ekzempleroj de kasidoj pri la du koncertoj en Spa (Bult. 1/91).

2. Kunlaboro kun IFEF

La 43a IFK okazis 11. - 17.5. en Olomouc (Olomütz) la unuan fojon en Ĉeĥo-Slovakio kun 380 partoprenantoj el 19 landoj, inter ili 39 germanoj. GEFA estis reprezentita de la komitatanoj Gießner, Herlitze, Kiefer kaj Rösemann. Kiel nova gvidanto de la Terminara Komisiono estis elektita nia germana membro Dieter Hartig, kiu ankaŭ daŭras redakti la internacian "Terminara Kuriero". Prez. Gießner invitis al la 44a IFK en Münster. 15 GEFA-membroj partoprenis la unusemajnan postkongreson e Zilina (Slovakio, v. Bult. 3/91).

GEFA estis oficiale reprezentita flanke de E. Kruse en la franca, de W. Lepke en la ĉeĥa jarkunvenoj kaj de J. Gießner en la fondkunveno de la nova rumana IFEF-asocio en Brasov/Sinaia (11.11.90).

Preparado de la 44a IFK en Münster

Dum la tuta jaro okazis kelkaj kunvenoj aŭ de kompleta LKK aŭ de unuopaj LKK-anoj. La provizora programo kaj unuaj informoj estas publikigitaj en IF 5/91.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 34a jarkunveno okazis en du diversaj lokoj, unue laborkunveno la 30.9.90 en Aachen. Poste 25 GEFA-anoj partoprenis (anstataŭ en kutima jarkunveno) en la Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco en Spa (B) 1.-7.10.90 (Bult. 5/90).

GEFA oficiale estis reprezentita en la kongreso de GEA en München pere de W. Ullmann. Aliaj membroj estis en diversaj Esperanto-aranĝoj kaj en la IFEF-skisemajno en Francio.

En decembro la BSW-ĉefestraro invitis la gvidantojn de ĉiuj kulturaj grupoj al Festenburg, por aŭdi informojn kaj interŝanĝi spertojn. Ĉeestis J. Gießner.

Krome Gießner kunvenis en januaro kun la afergvidanto por BSW en Berlin kaj kun la gvidantoj de la orientgermanaj fervojistaj esperantistoj, A. Meinel kaj H. Jasmann. Estis traktita provizora vojo al komuna estonteco.

4. Informado

4.1 Bulteno

Bulteno aperis kiel kutime en 5 numeroj kun entute 36 paĝoj, sur kiuj 5 fotografaĵoj aŭ fotomuntaĵoj.

4.2 Gazetaro, radio

En tagaj gazetoj, fakaj kaj sindikataj revuoj ni konstatis 93 kontribuadojn pri nia agado. Bv. legi la rekomendojn en la pasintjara raporto 4.2. Okazis 1 radiosendaĵo, 4 ekspozicioj kun entute 23000 vizitantoj kaj 14 fakaj prelegoj, el kiuj 1 duono en eksterlando (CS,H,RO). DB-informilo "Inter Rail" i.a. informas pri Pasporta Servo.

5. Varbado

Denove estis distribuitaj multaj informiloj, en-

tute 2400 ekz., krome elpendigitaj 30 afiŝoj en deĵorejoj kaj ekspozicioj. Ĉiuj klopodoj, interesiĝi junulojn por nia lingvo, estis vanaj.

6. Emerituloj

La ĉi-jara kunveno de la emerituloj estis aranĝita en Minden. 46 personoj sekvis la inviton de E. Kruse kaj travivis kiel kutime kelkajn agrablajn horojn en rondo de malnovaj geamikoj.

7. Perspektivo

Unue, ĉar ankaŭ tio apartenas al perspektivo,

mi astentigas vin pri la artikolo en Bulteno 2/91 paĝo 5. Temas pri savo de postlasaĵoj kaj heredaĵoj de esperantistoj. Bonvolu relegi tiun artikolon kaj zorgi, ke ne periĝos valoraj esperantaĵoj. La analizo de nia situacio por ĉiu leganto de tiu raporto estas klare ekkonebla. Mi deziras rekonduki vin al la lasta alineo de la pasintjara jarraporto. Tie mi diris, ke la fakto, ke multaj el ni ne plu estas junaj, **neniel malhelpas varbi kaj altiri novajn adeptojn.** Tio estas tasko nepre necesa. Kaj **de ĝia plenumado dependos la sorto de GEFA.**

Giessner

ESPERANTO-FERNKURSE

I

II

**ESPERANTO
EINE LEBENDIGE SPRACHE**

FORTBILDUNGSKURSUS

EINFÜHRUNGSKURSUS

**KONVERSACIA
KURSO**

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung

– Korrekturen

– Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 30,- DM

GEFA

**Viele Situationen
des täglichen Lebens
werden als
Gesprächsstoff behandelt.**

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung

– Korrekturen

– Beratung

KOSTEN: 40,- DM

– leicht und bequem daheim lernen –

Bestellen Sie durch Überweisung von 30,- DM bzw. 40,- DM an:

Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten

Konto 953 729 · Sparda-Bank Frankfurt (M) · BLZ 500 905 00

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

**ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN,
IST EIN ERLEBNIS**

GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!

Jarkunveno de la kolegoj de Reichsbahn

La fakgrupo de la fervojistaj esperantistoj de DR kunvenis de 25. ĝis 27.10.91 en agrable enarbara hotelo ĉe Saalfeld. Partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj, inter ili gekolegoj el, CS, H kaj PL. Flanke de BSW ĉeestis la ĉefkomisiito Giessner. En la oficiala membrokunveno oni pritraktis la estontan evoluon en la kadro de Reichsbahn-Sozialwerk. Giessner klarigis, ke laŭ la organiza formo den BSW ankaŭ en ĉiu nova direkcia distrikto estu unu distriktkomisiito (Bezirksbeauftragter), kondiĉe ke ekzistas minimume 8 ĝis 10 membroj. Alikaze oni havu provizore unu komisiiton por ĉiuj. Li kiel ĉefkomisiito de l'BSW-ĉefestraro estas kompetenta por ĉiuj distriktoj.

Ekde la 44. IFK Münster la du ankoraŭ ekzistantaj germanaj asocioj en IFEF komune prezentos sin sub nomo Germana Esperanta Fervojistaj Asocio. Tiel longe, kiel ankoraŭ ekzistas du germanaj fervojoj kaj ties du Socialaj Organizo, eventualaj aranĝoj estos organizataj laŭ interna interkonsento. La komuna laboro pri terminaraj aferoj jam bone funkcias. La plej proksima tasko estos organizado de postkongreso en majo 1992 en orienta Harz-montaro.

En la turisma parto de la jarkunveno bone sukcesinta ekskurso kondukis al la unika funikularo de Oberweißbach.

Gi

Termine

Frühjahrstreffen Arbeitsausschuß + Beauftragten

Fulda 2.5.1992

Seniorentreffen Hildesheim 16.4.1992

44. IFEF-Kongreß in Münster/Westfalen 16.5. - 22.5.92

Berichtigung

zu Bulteno 1/91

Esperanto-Fernkurse · Bestellungen und Zahlung nicht mehr über Joachim Schripp sondern über GEFA (s. besonderer Hinweis).

Sekretario

BHS a.D. H. J. Riehn, Betr.St. Bf 68/
6700 Ludwigshafen (Rh) Hbf

Karlsruhe und

Kasisto

BOS Bernhard
Privatanschrift:
Sauerbruchstraße 8, 6700 Ludwigshafen (Rh),
Tel. 0621 / 51 07 82

Frankfurt/Main

BAR a.D. Egon Kiefer (ab Januar 1992)
EDS an Bf 877 Lohr Bahnhof z.Hd. Herrn Kiefer

Redaktfino por n-ro 1/92 estas la 15.1.92

**Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝolĝan
Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.**

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, Sachsenstr. 7, 8620 Lichtenfels
Druck/preso: d.m.-druck GmbH, Holsteiner Straße 80, W-2800 Bremen 1